

★ Antaŭ ferioj

Estimataj klubaninoj, klubanoj, favorantinoj kaj favorantoj,

en la pasinta jarkvarono ni pro la “ĉina” malsano KOVIM-19 (jes, ni jam havas esperantan nomon de la malsano) ne povis kunvenadi kiel kutime. Niaj tutaj vivoj ne estis kiel antaŭe. Ni laboris hejme aŭ perdis laboron, devis “instrui” en hejmaj lernejoj, kuiri kaj preskaŭ ne povis eliri el niaj hejmoj.

Malgraŭ la malsano ni ne rezignis kaj nia laboro por Esperanto daŭris.

Mi ne scias pri ĉiuj el vi. Do mi petas vin, ke vi skribu al mi, kion vi faris por Esperanto dum la pasintaj tri monatojn. Se vi skribus ĝis la 10-a de julio, mi metos tion sur nian retpaĝaron, fejsbukan paĝon kaj resendos al vi. Longe neniu aŭdis pri ni. Estus bone, ke ĉiuj vidu, ke ni dum kvaranteno ne dormis. Dankon por via helpo.

Kiel vi verŝajne jam scias, la klubejo ĉe Starobrněnská finiĝas. De septembro ni renkontados en nova klubejo ĉe Křenová 57, apud tram-haltejo „Masná“. Ankaŭ tempo de niaj kunvenoj estas nova. Niaj kunvenoj ne estos merkrede, sed nove marde, de la 18-a ĝis la 19-a horo. La haltejo “Masná“ estas la dua haltejo de ĉefa stacidomo, same kiel haltejo Šilingrovo náměstí, sed en alia direkto.

Ni esperas, ke nova klubejo estos bona loko por niaj esperantistaj kunvenoj. Ni ankaŭ esperas, ke klubanoj kaj favorantoj, kiuj ne povis venadi merkrede, povus alvenadi marde.

Kiel kutime, niaj kunvenoj dum ferioj ne okazos. La unua renkontiĝo okazos la 1-an de septembro je la 18-a vespere ĉe Křenová 57.

Nia programo estas tia, kian ni preparos ĝin. Mi tial petas vin, ke vi sendu proponojn de programo por aŭtuno.

Multaj someraj Esperanto-aranĝoj estas ĉi-jare nuligitaj aŭ prokrastitaj. Kelkaj el ili okazos rete. Ekzemple [Somera Esperanto Studado](#), kiu estis okazonta en Kroměříž, estas prokrastita al venonta jaro. Ĉi-jare ĝi okazos rete. Ni rekomendas. Vi ne devos vojaĝi, sed vi povos paroli Esperante kaj plibonigi vian lingvon.

Ni restu sanaj, praktiku Esperanton kaj esperu, ke ĉio estos denove bone kaj ni renkontos septembre.

Ni bondeziras al vi bonan someron. La bondeziraĵon verkis Oldřich Arnošt Fischer, ni kore dankas.

Milan Kolka kaj Mirek Malovec

**ESPERANTISTA KLUBO BRNO DEZIRAS AL SIAJ KLUBANOJ
KAJ FAVORANTOJ BELAN SOMERON.**





Pozvánky Vám chodí, protože jste členy klubu nebo příznivci, kteří souhlasili se zasíláním pozvánek. Souhlas můžete kdykoliv odvolat, stačí to napsat v odpovědi na tento e-mail.

Program klubu můžete též zjistit:

- na našich webových stránkách (<http://www.esperantobrna.cz/malnova/program.htm>),
- na naší stránce na Facebooku (<https://www.facebook.com/esperantobrna/>)
- a na Eventa servo (https://eventaservo.org/o/EO_Brna)